Martinus Institut

N-ro 1 - 2016

# Kosmos


## La Kosmologio de Martinus

**Martinus:**
Kontakto al spirita mondo.
Eltrio el La Eterna Mondbildo 2

**Martinus:**
Respondoj pri spirita mondo kaj mediumoj

**Martinus:**
La vojo al paradizo.
Eltiro de libreto 25

**Ole Therkelsen:**
Eldono de La Eterna Mondbildo 6



© Martinus Institut 1981 Reg. 21

Kontaktoj inter la spirita mondo kaj ni mem

Esperanto

# ENKONDUKO

**Kara leganto,**
en tiu ĉi numero vi povas legi pri *kontaktoj inter la spirita mondo kaj ni mem*. Kvankam multaj tute ne scias pri tia kontakto, estas granda aktivado en la spirita mondo por sekvi niajn vivojn, subteni nin kaj helpi nin eniri kaj trairi plej diversajn okazaĵojn. Okazaĵoj kiuj helpas al ni evolui, kelkfoje ili estas agrablaj kaj kelkfoje tre malagrablaj, tiel ke ni iom post iom iĝos ”veraj homoj”. Laŭ la mondbildo de Martinus eblas diri ke ni konsistas el: mio, konscio kaj korpo. Kiam nia konscio estas portata de nia fizika korpo, do kiam ni estas vekaj ĉi tie en la fizika mondo, ni kutime ne spertas ian rilaton kun la spirita mondo. Sed sen ke ni ion rimarkas estas spiritaj estuloj kiuj ”gardas” nin, laŭ Martinus. Krome Martinus klarigas ke ni dum profunda dormado povas rilati kun homoj en la spirita mondo. Tiuj homoj en la spirita mondo estas aŭ ”pretaj homoj” kiuj atingis tiom longe en la evoluo ke ili ne plu bezonas enkarniĝi aŭ ”terhomoj” kiuj estas inter du fizikaj vivoj. Ambaŭ tiuj aferoj, do 1) ke ni havas ”gardanĝelojn” kaj 2) ke ni rilatas kun homoj en la spirita mondo profund-dormante, estus vere mirindaj se ili estus veraj, ĉu ne? En tiu ĉi revuo vi povas legi pri tiuj eblaj mirindaĵoj kaj pripensi ĉu ili ŝajnas realismaj al vi.

Sur la ĉefpaĝo videblas simbolo n-ro 21 *”La eterna kosma organa kunligo inter Dio kaj la difilo – 1”*. La simbolo celas montri kiel la viva estulo kaj Dio estas eterne kunligitaj organe. La scio aŭ konscieco pri tiu ĉi organa kunligo trairas diversajn stadiojn ĉe la terhomo. Komence ĝi estas portata de instinkto kiu rezultigas firman kredon je la ekzisto de ekzemple dioj kaj spiritoj aŭ Dio kaj anĝeloj. Iom post iom la religieca kredo grade anstataŭiĝos de memspertitaj scioj, pro tio ke la inteligentkapablo kreskas en la psiko de la homo. En tiu periodo la homo spertas ĉefe fizike aŭ materie, kio sekvigas ke sole materiaj aferoj estas akceptataj kiel veraj faktoj. Tiamaniere la homo foriras de Dio tiom longe kiom eblas el konscieca vidpunkto. Per la travivado de la mallumo, kiu venas el la materiismo kaj la sendieco, kreiĝas iom post iom la humana kapablo kiu estas la bazo por la intuicikapablo, kiu siavice estas la sensilo por kosma travivado. Martinus havis tian kosman travivadkapablon kaj per ĝi li akiris informojn pri la vivo ”malantaŭ” la fizika sfero kaj povis krei analizojn pri ili verkante librojn, kreante simbolojn kaj prelegante al multaj homoj.

Ni elektis la simbolklarigon pri simbolo n-ro 21 ĉar ĝi bone prilumas la temon – *kontaktoj inter la spirita mondo kaj ni mem*. Post ĝi sekvas eltiraĵo el la libreto *Vojo al Paradizo* kaj du respondoj de Martinus al demandoj kiuj rilatas al la temo. Estas nia espero ke leginte tiun ĉi numeron de la revuo Esperanto-Kosmos vi havos pli da kompreno pri kiel la regula kontakto kun la spirita mondo influas vian vivon, tage kaj nokte...

Bonan legadon kaj pripensadon!

# Simbolo n-ro 21
# La eterna kosma organa kunligo inter Dio kaj difilo – 1

*Simbolo n-ro 21 konsistas el tri partoj. Jen sekvas mallonga resumo de du el ili.*

1. *La simbolfiguro en la dekstra parto montras ke ĉiu viva estulo troviĝas meze de la universo aŭ Dio:*
   *– La figuro malekster la nigra zigzageca kampo simbolas la vivan estulon aŭ la difilon.*
   *– La figuro ekster la nigra zigzageca kampo simbolas la universon aŭ Dion.*
   *– La zigzageca nigra kampo montras ke la distanco inter Dio kaj la difilo eterne estas la sama, sendepende de tio ĉu la difilo scias tion aŭ ne.*

2. *La supra parto maldekstre en la simbolo montras kvar stadiojn en la ligo inter la viva estulo kaj Dio. La rondaj figuroj kun triangulo meze simbolas vivan estulon en ĉiuj el la kvar stadioj.*
   *– La figuro plej maldekstre simbolas naturhomon kiu havas unuajn sensetojn pri la ekzisto de pli altaj estuloj, spiritoj aŭ dioj.*
   *– La venonta figuro simbolas estulon kiu kredas je unu vera kaj reala Dio.*
   *– La tria figuro simbolas la materiecan kaj sendian homon.*
   *– La kvara figuro simbolas la pretan homon kun kosma konscio kaj tagkonscia travivado de Dio.*

3. *La simbolfiguro maldekstre malsupre estas detale priskribita en la sekva teksto de Martinus.*

**21.20** En la simbolo maldekstre malsupre ni vidas regionon markitan per pluraj trianguloj. Kiel kutime tiuj simbolas vivajn estulojn kaj en ĉi tiu kazo homojn. La plej malsupra sekcio kun la oranĝkoloraj trianguloj simbolas fizikajn homojn. Kaj la figuro kun la menciitaj oranĝkoloraj trianguloj simbolas la fizikan sferon. La du supraj longaj sekcioj kun la flavaj trianguloj simbolas spiritajn vivsferojn, kaj tie la trianguloj simbolas spiritajn estulojn. En la maldekstra figuro de la plej malsupra longa sekcio ni vidas du oranĝkolorajn triangulojn. De la triangulo n-ro 1 deiras kelkaj flamoj en la sama koloro. Tio signifas fizikan homon en mizero. La flamoj signifas, ke ĝi turnas sin al estulo n-ro 2 por peti pri helpo. De tiu estulo ne deiras flamoj. Tio signifas, ke tiu estulo ne volas aŭ ne povas helpi estulon n-ro 1. Kaj ĉar ĝi eventuale ankaŭ ne povas ricevi helpon de aliaj fizikaj homoj, ĝi direktis preĝon al Dio. Tion simbolas ĝiaj flamoj, kiuj montras supren al la spiritaj sferoj. La preĝanta fizika estulo ne konas tiujn spiritajn sferojn, kaj ankaŭ ne konas la estulojn en ili. Kaj la sferoj kaj la estuloj estas nevideblaj por la estulo. Sed ĝi direktas


do sian preĝon al tiu nekonata nevidebla regiono, al la sola viva estulo en tiu regiono, kiun ĝi lernis koni, nome al Dio.

**21.21** Sed kiel Dio povas aŭdi tian preĝon? - Estas ĝuste, se Dio estus difilo aŭ ordinara viva estulo kiel ni mem, do estus tute maleble por Dio havi tiun ĉieestan konscifunkcion, manifestad- kaj travivadkapablon, kiu necesas, por ke li povu interrilati konscie, sense kaj kree kun ĉiu ekzistanta viva estulo en la spaco, senkonsidere ĉu ĝi estas mikrokosma, makrokosma aŭ mezkosma estulo. Dio havas ĝuste tian ĉieestan funkcikapablon, travivad- kaj manifestad- aŭ kreokapablon. Estas ĝuste tiu giganta povo de manifestado kaj travivado, kiu kreas la diferencon inter Dio kaj la difilo. La difilo estas nur unuopa eta loka organo de travivado kaj manifestado en la konscio de Dio, sed kompare kun ĉiu unuopa difilo aŭ viva estulo Dio havas ĉiujn aliajn ekzistantajn difilojn aŭ vivajn estulojn kiel ilojn por manifestado kaj travivado.

Tial estas tute egale, kie ajn troviĝas unuopa viva estulo aŭ difilo. Neskueble ĝi estas ĉirkaŭita de vivaj estuloj, kaj tio signifas ankaŭ: ĉirkaŭita de iloj de travivado kaj manifestado de Dio. Se ne troviĝas fizikaj estuloj ĉirkaŭ ĝi, do ĉiam nepre troviĝas en ĝia proksimeco spiritaj estuloj, pere de kiuj Dio povas kaj observi ĝian situacion kaj doni al ĝi eventualan helpon kaj apogon en certaj, mizeraj situacioj, aŭdi ĝiajn preĝojn kaj eventuale influi ĝian sorton. Ni nun komprenas, kiel Dio povas esti ĉieesta kaj povas reagi al la vivfunkcio de absolute ĉiu unuopa ekzistanta viva estulo.

**21.22** Tial ni nun reiras al nia klarigo pri tiu estulo, kiu direktis sian preĝon al Dio.

Kiel jam menciite, la preĝanta estulo estas en la simbolo montrita kiel la tria oranĝkolora triangulo de maldekstre en la malsupra sekcio kun la oranĝkoloraj trianguloj. Ĝi estas markita per n-ro 1. La flamoj, kiuj de tiu estulo montras supren, simbolas, ke ĝi preĝas al Dio. Ni vidas, ke punkta linio iras de la estulo supren al flava triangulo. Tiu simbolas do spiritan estulon. Kaj la sekcio, en kiu ĝi troviĝas, simbolas la spiritan sferon. De tiu spirita estulo, kiu estas markita per n-ro 2, deiras kelkaj oranĝkoloraj flamoj, kaj punkta linio, kiu montras malsupren al fizika estulo markita per n-ro 3. De tiu estulo deiras, kiel montras la simbolo, flamoj al estulo n-ro 1. Tio signifas, ke estulo n-ro 1 ricevas helpon de estulo n-ro 3, kiu ankaŭ estas fizika estulo. Sed kiel okazis, ke la preĝanta estulo n-ro 1 ricevis helpon de fizika estulo, kiun ĝi fakte tute ne konas? - Ĝi ricevas tiun helpon pro sia preĝo al Dio. Tiu preĝo estis aŭdita de la spirita estulo n-ro 2, kiu siaflanke laŭ ia psika maniero influis la estulon n-ro 3, kiu per tio kontaktiĝis kun la estulo en mizero kaj helpas al ĝi. Kaj tiel por ĝi plenumiĝas ĝia preĝo al Dio. Sed ĝi neniel ajn konas tiun spiritan estulon n-ro 2, pere de kiu Dio aŭdis ĝian preĝon kaj aktivigis la plenumon de tiu preĝo pere de la fizika estulo n-ro 3. Sed ĉar ankaŭ estulo n-ro 3 neniel ajn konas la spiritan estulon n-ro 2, ĝi nur sentis fortan instigon helpi la estulon kiu estis en mizero, kaj kun kiu ĝi kontaktiĝis en ia ŝajne hazarda maniero. Kaj tial por la neinicita aŭ materiisma homo la elaŭdo kaj la renkontiĝo de la du estuloj aspektas kiel hazardo, sed la preĝanta estulo ricevis stimulon al siaj kredo kaj fido al Dio. Estas ĝuste, ke fizika homo en mizera stato tre bone povas renkonti alian fizikan homon, kiu sen ia ajn inspiro aŭ instigo de spirita estulo, sed nur pro sia kunnaskita humana kapablo, sentas sin instigita helpi la homon en mizero. Sed tiam la situacio ja estas tute alia ol tiu, kiun ni ĵus priskribis. Tie la estulo ja havas tiel facilan aliron al helpo en



Reg. 21

Simbolo n-ro 21 *La eterna kosma organa kunligo inter Dio kaj diflo – 1*

© Martinus Institut 1981

sia mizero, ke ĝi tute ne bezonas alvoki helpon per preĝo al Dio. En la kazo, kiun ni antaŭe priskribis, la estulo estis en situacio, kie neniel ekzistis eblo por fizika helpo. Ekz. povas okazi, ke la estulo akcidentis kaj fariĝis senhelpa en loko, kie ne ĉiutage venas homoj. En tia situacio la psika forto de la preĝo aŭ tiu organa kontakto de la estulo kun la plej alta estulo, estas ĉiosuperbrila amdonaco, kiun ĝi ricevis por sia vivo. Per tiu supertera aŭ kosma forto ĝi povas veni en situacion, kie ĝi vidas Dion kaj travivas la proksimecon de tiu plej alta estulo meze en la kulmino de siaj suferoj, meze en sia propra getsemano, meze en la plej profunda mallumo aŭ kataklismo de sia vivo. Tie la difilo povas voki sian patron, kaj la patro montros sin por sia malfeliĉa filo per tiuj anĝelaj estuloj, kiuj estas specialaj organoj por lia praktikado de amo al estuloj en la mallumo.

**21.23** Sed ĉi tie oni lernu kompreni, ke la dia helpo, kiun la estulo povas ricevi per sia preĝo, ne signifas, ke subite oni liberiĝas de tiu sufero aŭ tiu malbono, de kiu oni estas turmentata, kaj de kiu oni petas liberiĝon per sia preĝo. Nur en specialaj esceptaj kazoj la estulo povas esti antaŭdestinita por mirakla kuraco de malsano aŭ por mirakla liberigo de aliaj specoj de sortaj malbonoj. Se per sia preĝo oni povus liberiĝi de kia ajn sorta malbono, kio signifas de la efikoj de la malbono, kiun oni kaŭzis al aliaj estuloj, do neniu ajn evoluo povus okazi. La kreado de la homo fare de Dio laŭ lia bildo ĉesus komplete. Kiel iu estulo povus atingi komprenon pri la efikoj de siaj malbonaj agoj, se ĝi ne spertus ilin en sia propra organismo kaj en sia propra anima vivo? - Ricevi teorian instruadon pri la suferoj ne estas la samo kiel sperti la suferojn. Por vere kompreni la suferojn necesas sperti ilin en siaj propraj karno kaj sango, kaj sperti la sekvantajn efikojn en sia propra anima vivo. Kaj estas ja ĝuste tiu anima kompreno pri la suferoj, kiu rezultigas la humanan kapablon, kiu estas la kapablo ne povi elteni kaŭzi al aliaj estuloj ion malbonan. Kaj estas ja ĝuste laŭ la kresko de tiu kapablo, ke estiĝas tiu perfekta homo, kiu amas Dion super ĉiuj aferoj kaj sian proksimulon kiel sin mem (Mat. 22.37-39).

Ĉi tie oni do komprenas, ke la preĝo absolute ne ekzistas por malebligi tiun evoluon de la estulo al perfekteco kaj lumo. Sed ĝi ekzistas plej altgrade por esti ilo, per kiu la homo povas voki al si helpon - ne por liberiĝi de la sufero, de la malluma sperto, kiun ĝi ĝuste devas havi kiel nutraĵon por sia evoluo, por sia transformo de krudo al humaneco, de malamo al amo, sed male por riĉiĝi per forto kaj inspiro por partopreni tiun influon de Dio, tiun Dian modeligon de ĝi mem direkte al la granda celo: la homo laŭ la bildo de Dio simila al li (Gen. 1.26-27). Per la preĝo al Dio la homo vere povas atingi optimismon rilate al sia malfeliĉa situacio, eĉ tiagrade ke en tiu sia malluma situacio ĝi povas vidi la benon de Dio kaj sperti ĝin kiel bonon, kaj eĉ povas senti inklinon danki al Dio pro ĝi, kvankam ĝi estas malagrabla bono. La principo kaj strukturo de la preĝo estas pordo malfermita al Dio kaj al la plej altaj mondoj, senkonsidere kiel ajn profunde en mallumo, kataklismo aŭ infero oni troviĝas. Tra tiu malfermita pordo al la regnoj de la lumo aŭ la paradizo Dio aŭskultas sian eternan filon en la situacio de mizero. Kaj tra tiu malfermita pordo li prenas sian malfeliĉan filon al sia koro.

**21.24** En la tria sekcio de maldekstre en la malsupra figuro en la simbolo la oranĝkolora triangulo simbolas elstaran intelektan homon, ekz. elstaran verkiston, artiston, komponiston, aktoron aŭ humanan sciencistON. Kelkfoje tia estulo havas fortajn inspirojn, kio

signifas, ke ĝi havas por sia speciala vivintereso fortajn spiritajn instigojn aŭ stimulajn impulsojn en tre pozitivaj direktoj. Tiuj estuloj povas ricevi ankaŭ intuiciojn. La inspiroj povas esti interalie instigoj de spiritaj estuloj, sed intuicio male estas rekta perceptotravivado per tiu ankoraŭ delikata kosma senso de la estulo. Sed tiu kapablo evoluas nur laŭgrade, same kiel ankaŭ ĉiuj aliaj kapabloj. Tute laŭ tio, ke la estulo evoluas en humaneco, estiĝas la intuicikapablo. Kaj la estulo povas komenci travivi etajn kosmajn ekbrilojn. Ili povas aperi kiel subitaj solvoj de malgrandaj pensproblemoj rilate al ĝiaj vivinteresoj. Poste, kiam la humana kapablo, kaj per tio ankaŭ la intuicikapablo, estos pli evoluintaj, povos okazi por la estulo, ke ĝi travivos unuopajn grandajn kosmajn ekbrilojn. Sed provizore tiuj okazas nur kun grandaj intermitoj. En tia ekbrilo ĝi povas ekz. percepti sian propran senmortecon. En alia ekbrilo ĝi povas percepti, ke Dio ekzistas. La ekzisto de Dio, la senmorteco kaj aliaj perceptoj pere de la kosmaj ekbriloj montriĝas do faktoj por la estulo mem. Tio kompreneble ne signifas, ke la fenomenoj en la kosmaj ekbriloj montriĝas faktoj por aliaj estuloj. Kosmaj fenomenoj povas montriĝi fakto por tiuj aliaj estuloj nur pere de iliaj propraj intuiciaj travivaĵoj aŭ kosmaj ekbriloj. Kaj por estuloj, kiuj ankoraŭ tute ne havas kosmajn ekbrilojn aŭ kosman konscion, kosmaj fenomenoj neniel povas evidentiĝi kiel memspertita fakto. Ili do ne povas fariĝi ia senpera scio por tiuj estuloj. Maksimume ili povas fariĝi teoria scio. Tial estas tiu diferenco inter la materia scienco kaj la spirita scienco aŭ vera kosma scienco, ke la materia scienco estas rezulto de sensoj, kiujn havas homoj ĝenerale, kaj kiuj sekve povas montriĝi fakto por ĉiuj, sed la reala kosma scio aŭ scienco estas rezulto de sensoj, kiujn havas ankoraŭ nur minoritato. Sekve de tio kompreneble eblas montri ĝin fakto por tiu minoritato nur laŭ la evoluo de ties humana kapablo kaj laŭ la sekvanta intuicia kapablo. Tial ankoraŭ dum longaj tempoj la granda plimulto de la homoj de la tero restos skeptikaj rilate al vere kosma scio aŭ spirita scienco.

De la ĉi tie menciita estulo ni vidas, ke en la simbolo flamoj iras supren. Tio simbolas, ke ĝi estas alte evoluinta spirita aŭ intelekta homo. La punkta linio kondukas de tiu estulo markita per n-ro 1, supren al spirita estulo, kiu troviĝas en alta spirita sfero. De tiu estulo, kiu estas markita per n-ro 2, la punkta linio pluiras al spirita estulo sur same alta nivelo. De tiu estulo, kiu estas markita per n-ro 3, la punkta linio (*) pluiras al spirita estulo markita per n-ro 4 sur suba nivelo. Tio ne signifas, ke estulo n-ro 1 havas konscian kontakton kun tiuj altaj spiritaj estuloj. Male tio simbolas, ke altgrade ĝi inspiriĝas de tiuj estuloj, kvankam nekonscie, kaj ke spiritaj estuloj povas esti kunefikaj en elstaraj humanaj kaj intelektaj kreaĵoj aŭ manifestaĵoj fare de fizika homo sen tio, ke ĝi sekve bezonas esti mediuma. Mediumeco estas alia kapablo, al kiu ni baldaŭ revenos. Tiuj fortaj humanaj kaj intelektaj inspiroj kaj malpli grandaj intuiciaj informoj okazas speciale altgrade en tiuj personoj, kiuj devas solvi grandajn humanajn kaj intelektajn kulturajn taskojn. Tio okazas en estuloj, kiuj devas krei novajn plibonigitajn tradiciojn en scienco, arto kaj politiko. Troviĝis inspiraj gvidaj spiritaj kaj kunagaj estuloj malantaŭ ĉiuj tiel nomataj "grandaj viroj kaj virinoj", kiuj havis grandegan humanan kaj intelektan signifon en la kondukado de la homaro antaŭen al pli altaj kulturstadioj. Estas ĝuste, ke la

(*) Tiu linio ne estas montrita en la simbolo

koncernaj fizikaj estuloj ne konsciis pri la ĉeesto de tiuj estuloj. Sed en multaj kazoj ili sentis, ke Dio apogis ilin, ke ili dediĉis sin al tiu Dio kaj per tio ricevis kaj inspiron kaj forton por daŭrigi sian ne ĉiam facilan mision. Sekve tiuj spiritaj estuloj malantaŭ ilia misio igis ilin senti, ke Dio apogis ilin. Tiuj estuloj estis ja ĝuste la organoj de Dio, pere de kiuj li inspiris kaj helpis la koncernajn estulojn en ilia misio. Kaj tiel malantaŭ ĉiuj ekzistantaj gvidaj estuloj en la homaro, kaj en milito kaj en paco, troviĝas spiritaj estuloj kiel helpo por tiuj, kiuj en la fizika sfero devas realigi la gvidadon kaj sorton de la homaro. Estas tiuj spiritaj estuloj malantaŭ la fizikaj gvidantoj de la homaro sur ĉiuj kampoj, kiujn ni nomas "la providenco". Troviĝas diaj spiritaj estuloj malantaŭ la fizikaj gvidantoj de la plej primitivaj naturhomoj: tribestroj kaj magiistoj. Kaj tute same troviĝas diaj spiritaj estuloj malantaŭ ĉiuj gvidantoj de la pli altaj kulturhomaj socioj: reĝoj, prezidantoj, diktatoroj, ekleziaj aŭtoritatoj, papoj, episkopoj kaj pastroj, aŭtoritatuloj kaj justicoj, militistaroj, asocioj, religiaj sektoj kaj socioj, fakaj movadoj, politikaj partioj ktp., tute malsupren al la unuopa homo, la unuopa besto, la unuopa planto kaj la unuopa kristalo. Sekve ne troviĝas io ajn en la fizika sfero, kio ne estas submetita al la atento de spirita providenco, kaj pro kio Dio partoprenas la ĉiutagajn vivon kaj sorton de ĉiu unuopa ekzistanta viva estulo, same en la mallumo kiel en la lumo. Kaj kiam ajn kaj en kia ajn situacio, feliĉa aŭ malfeliĉa, ĝi povas en formo de preĝo turni sin al tiu plej alta estulo kaj ricevi inspiron, forton kaj kuraĝon por akcepti la mallumon de sia sorto kaj per tio konscie partopreni transformadon de si mem de besto al homo fare de Dio laŭ lia bildo simila al li (Gen. 1.26-27).

**21.25** En la simbolo en la meza el la tri longaj sekcioj kun la trianguloj ni vidas, ke de la kvina flava triangulo en la vico de maldekstre kaj markita per n-ro 1 deiras kelkaj oranĝkoloraj flamoj kune kun punkta linio. Tiu linio iras al triangulo n-ro 2. De tie ĝi pluiras malsupren al oranĝkolora triangulo n-ro 3. De tiu triangulo deiras flamoj direkte al triangulo n-ro 4, de kiu deiras ankaŭ flamoj. Tiuj montras direkte al triangulo n-ro 3. Kiel ni jam scias, la flavaj trianguloj n-ro 1 kaj n-ro 2 simbolas spiritajn estulojn, dum la oranĝkoloraj trianguloj n-ro 3 kaj n-ro 4 simbolas fizikajn estulojn. La oranĝkolora punkta linio kaj la flamoj tie simbolas alian specon de kontakto kun la spiritaj mondoj ol tiun, kiu laŭ tio, kion ni ĵus lernis, okazas kiel rekta preĝo al Dio. Tie la kunligo estas mediuma. Ĝi estas multe pli primitiva kontakto kun Dio ol la preĝo, kiu estas tiel altpsika, ke ĝi ampleksas ĉiujn stadiojn en la rilato de la estulo al Dio. La preĝo etendiĝas ekde la timkrio de la besto antaŭen al la tagokonscia kunesto de la kosme konscia estulo kun la ĉiopova, ĉioscia kaj ĉioama Dio kiun ĝi tagokonscie perceptas.

Dum la objekto de la tute perfekta preĝo estas la absolute sola vera Dio, la mediuma kontakto kun la spirita mondo ne estas direktita al Dio. Efektive la preĝo estas direktita nur al spirita estulo, kun kiu oni povas fizike interparoli pere de mediuma homo. Tio okazas tiel, ke la mediuma homo havas la kapablon ektranci, veni en profundan dormsimilan aŭ senkonscian staton. Triangulo n-ro 3 simbolas tian estulon, kiu nomiĝas "mediumo". La punkta linio, kiu iras de la spiritaj estuloj n-roj 1 kaj 2 al la mediumo, alivorte al la triangulo n-ro 3, esprimas, ke dum la tranco de la mediumo tiuj spiritaj estuloj povas pli aŭ malpli okupi ties fizikan korpon kaj samgrade fizike interparoli kun fizika estulo. Tion simbolas la flamoj de

n-roj 3 kaj 4. Do ne estas la mediumo, la estulo n-ro 3, kiu parolas al la fizika estulo n-ro 4, sed male estulo n-ro 1, kiu de la spirita sfero parolas al tiu estulo. La spirita estulo n-ro 2 estas estulo, kiu dum la tranco partoprenas protekton de la mediumo kontraŭ obskuraj malamaj kaj konfuzaj spiritoj de la purgatoria sfero, kiuj klopodas kontakti la fizikan sferon, de kiu ili ĵus mortis. Sed ankoraŭ ili ne komprenas sian situacion.

Ĉar ili povas esti amaraj kaj koleraj kaj tute fermitaj al helpo, do estas tre danĝere por la mediumo, se tiaj estuloj okupas ĝian organismon. Tio povas kaŭzi grandan damaĝon. Sen sekura spirita protekto estas tre danĝere ektranci aŭ alimaniere disponigi sin al tiuj purgatoriaj spiritoj. Estas tre malfacile por la fizika homo kontroli la eldirojn, kiujn tiaj spiritoj ricevas okazon prezenti per la korpo de la mediumo. Tute dogme kaj blinde kredi je tiaj spiritaj informoj, ankaŭ tio povas esti danĝera. Tamen tio ne malebligas, ke povas okazi aliaj formoj de kontaktospecoj inter la fizika kaj la spirita sferoj, ekz. per materiigo kaj nemateriigo. Ili estas fenomenoj, kiuj devas evolui por povi liberigi la homojn de ilia proceso de naskiĝo kaj morto en la fina epoko de ilia reenkarniĝo aŭ renaskiĝo en la fizikan sferon. Tiam per tiu principo de materiigo kaj nemateriigo kaj volforto, la homoj povos vesti sian spiritan strukturon per certa speco de fizika substanco kaj per tio aperi en fizika figuro videbla por fizikaj sensoj. Kaj same rapide ĝi povos denove forigi la fizikan materion de sia spirita strukturo, kaj tiam ĝi denove fariĝos nevidebla en la fizika sfero. Estas tiu principo, kiu estas bazo por ĉia spirita rivelo en la fizika sfero. Sed por la homoj de la tero tiu kapablo apartenas ankoraŭ al tre malproksima estonteco. En certaj kazoj tiuj aliaj menciitaj spiritaj kontaktoj pere de mediumeco povas montri pozitivajn rezultojn. Sed tamen ni atentigas ĉi tie, ke kontakto inter la fizika nefina homo kaj la spirita sfero estas absolute nur centprocente natura kaj per tio samgrade sendanĝera, kiam ĝi okazas en preĝo direktita rekte al Dio, kaj kiam la baza tono en tiu preĝo estas tiu, ke unue kaj antaŭ ĉio plenumiĝu la volo de Dio.

**21.26** Kaj nun ni venas al la lasta parto en la malsupra longa sekcio. La oranĝkolora triangula figuro simbolas la finan homon laŭ la bildo de Dio simila al li (Gen. 1.26-27). La flamoj kaj la punktaj linioj, kiuj kontaktigas la estulon kun la spiritaj estuloj kaj sferoj, simbolas ĉi tie, ke ĝi havas konstantan kosman konscion. Tio signifas, ke en maldorma fizika tagokonscio ĝi povas percepti la kosmajn vivrezultojn, la strukturon de la universo, la ekziston de Dio aŭ mallonge dirite: la solvon de la vivmistero mem. Ĝi trapasis la grandan naskiĝon aŭ tiun vastiĝon de konscio, kiu sekvigis, ke ĝia intuicikapablo aŭ kosma perceptotalento fariĝis komplete perfekta. Per tiu kapablo la estulo fariĝas konforme suverena en kosma scio, kaj per tio sentas sin unu kun la vojo kaj la vero kaj la vivo (Joh. 14.6), unu kun la senmorteco kaj la eterno. La spiritaj estuloj, kun kiuj ĝi estas kunligita per la punktaj linioj, simbolas la altajn kosmajn estulojn, kiuj por la fina homo formas la fenomenon Dio. Ke la simbolo montras nur tri estulojn, tio ne signifas, ke troviĝas por la menciita estulo nur tri estuloj en la fenomeno Dio. Male tio signifas, ke ĝuste troviĝas multaj estuloj. Pere de tiaj estuloj Dio aŭdas la preĝon de la kosme inicitaj estuloj. Kaj pere de ili li respondas tiujn preĝojn, ja eĉ sen tio, ke la preĝanta estulo konas tiujn estulojn. Kutime tiuj estuloj funkcias nur kaŝe. Tial oni povas direkti sian preĝon al ili nur pere de la nocio Dio. Kaj la respondo

al la preĝo estas perceptata ankaŭ kiel respondo de Dio. Sed tiuj estuloj estas do la kaŝitaj organoj aŭ iloj de Dio por lia reago al la preĝo de la viva estulo. Pere de tiuj estuloj Dio benas kian ajn vivan estulon, kiu en sia preĝo direktas sian konscion al li, ja eĉ se ĝi perdis la kapablon kredi je li. Tial neniu estulo en mizero devas reteni sin de preĝo al Dio, eĉ ne se ĝi perdis la kapablon kredi je li. Dio vidas, ke tia estulo bezonas lian helpon eĉ pli ol tiu estulo, kiu estas dotita per preskaŭ neskuebla kredokapablo. En klarigo pri simbolo n-ro 22 ni pli detale traktos tiun strukturon de la preĝo.

**21.27** Antaŭ ol pluiri ni rimarkigas, ke ĝis nun neniu estulo ĉi tie sur la tero povis evolui antaŭen al la finevoluinta stadio, kie ĝi fariĝis la homo laŭ la bildo de Dio simila al li (Gen. 1.26-27). Kiam tia fina homo, kiel la antaŭe priskribita, montris sin en karno kaj sango, aperis en fizika organismo, do tion ĝi efektive povis fari nur kiel gasto sur la tero. La ebloj por atingi antaŭen al tiel alta evolunivelo ĝis nun ne troviĝis ĉi tie sur la tero. Kaj atinginte maturecon por evoluepoko, kiu ankoraŭ ne estis ebla sur la tero, la estuloj devis enkarniĝi aŭ naskiĝi en mondon aŭ sur planedon, kiu estis tiom pli progresinta en evoluo, ke ĝi havis kondiĉojn por tio, ke la estuloj tie povis evolui tute antaŭen al la fina stadio kaj fariĝi la homo laŭ la bildo de Dio simila al li. Multaj el la progresintaj viroj kaj virinoj de la estinteco estas antaŭ longe enkarniĝintaj sur tia pli alta planedo aŭ en mondo, kiu jam nun estas tiom fina aŭ perfekta homa mondo, kiel la terglobo iam fariĝos. - Estas nur en la nova epoko de mondliberigado, kiu komencis per la dudeka jarcento, ke la homoj sur la tero povos finevolui al la bildo de Dio simila al li. Laŭ tio, ke en la venontaj jarmiloj la teraj homoj fariĝos finaj homoj, ili kune kreos la komplete perfektan homregnon, kiu plue estas la samo kiel la ĉiela regno sur la tero. Estas tiu regno, kies alvenon anoncis Kristo, kaj en kiu estu nur unu grego kaj unu paŝtisto (Joh. 10.16). Tio signifas ankaŭ, ke la tuta homaro de la tero fariĝos unu popolo kultanta absolute nur la solan veran Dion. Kaj kiel regno de finaj homoj povus fariĝi io alia ol regno de lumo? - Tia regno estos ja regata de la plej pura proksimula amo. La homoj sur la tero povos nun dum la plej proksimaj jarmiloj evolui antaŭen al tiu alta stadio, interalie ĉar en la nova epoko de mondliberigado ili fariĝos kapablaj okupi sin pri vere kosma scienco, sammaniere kiel ili nun okupas sin pri la materia scienco. Per tiu altpsika scienco la homoj havos scion pri la strukturo de la universo, pri Dio kiel la eterna origino de la universo, pri la ekzisto kaj strukturo de la vivaj estuloj, kaj per tio ankaŭ pri la leĝo de la dia konduto kaj pri la rezultanta liberiĝo de la estuloj de la mallumo kaj la suferoj, liberiĝo de kataklismo. Tiu klarigo sekve fariĝos fundamenta aŭtentigo de la dia brilabundo de la sankta spirito de Dio, kiu de la mondliberiganto Jesuo Kristo vibris kiel nova kosma sunleviĝo super la mondo. En tiu lumo ĉiuj gentoj de la tero estos benataj, fariĝos la homo laŭ la bildo de Dio simila al li. Ĝuste tiu dia lumo farita alirebla por okuloj, inteligento kaj koro, estos la mondliberigado de la dudeka jarcento.

(Tradukis Ib Schleicher.)

## Demando: Ĉu ekzistas natura kunligo inter la vivantaj kaj la tiel nomataj "mortintaj" sen helpo de mediumoj?

**Respondo de Martinus:**
Inter la vivantaj kaj ”la mortintaj” ekzistas tre granda vivgrava kaj aktiva kontakto. Dum la morto la maldorma, fizika tagkonscio de estulo transdoniĝas al ties noktokonscio, kiu konsistigas la tagkonscion de la sama estulo en la spirita aŭ psika sfero. Ĉar la tagkonscio de la fizikaj estuloj transdoniĝas al la noktokonscio ankaŭ dum la profunda normala dormado, ili tiam havas maldorman tagkonscion en la sama sfero kiel la ”mortintaj”. La vivantaj kaj ”la mortintaj” tiam povas ĉi tie daŭrigi la reciprokan pensointerŝanĝon kaj la deziratan kunumadon, kiujn ili ne plu povas havi en la fizika sfero. Gravaj ideoj, avertoj, konsiloj kaj gvidado estas ĉi tie interŝanĝataj grandskale inter estuloj de ambaŭ sferoj. Eĉ se la memoroj pri tia spirita kunestado kaj la rilataj travivaĵoj tute mankas en la fizika tagkonscio post la vekiĝo, ili tamen estas plantitaj en la subkonscion de la sama estulo kaj povas de tie, dum apartaj cirkonstancoj aŭ situacioj, transformiĝi al la maldorma fizika tagkonscio. Tiam ili en intuicisimila maniero fekundigas la pensomondon de la koncerna estulo per la scio, la spirita aŭ psika materialo, kiu estis la kerna enhavo de la spirita kunestado.

Tiel ĉiuj vivaj estuloj havas sendanĝeran kaj protektitan kontakton kun la spirita mondo. La morto ne estas la granda disiĝo de la amataj aŭ karaj, kiel la teraj homoj normale imagas. Tio ĉi iom post iom fariĝos tia viva koncepto aŭ fakto, ke la malĝojo, kiu nuntempe kun malespero, larmoj kaj deprimo igas sepulton aŭ entombigon priplorata ceremonio, malaperos. Tio ŝanĝiĝos tiel ke, anstataŭ nigra, nigra kaj denove nigra, la entombigo estos festo de gratulo kaj lumo. La natura morto estas ĉiam liberigo de la reduktita vivtravivado kaj la de ĝi rilata spirita malliberejo, kiel estas la kunligo de senmorta spirito kun difekta aŭ kaduka organismo ne plu taŭga por vivtravivdo. Tia liberiĝo ne estu priplorata, sed gratulata.



Foto: morgueFile.com

**Demando:** Antaŭ nelonge mortis vira parenco, kies edzino mortis 12 jarojn pli frue. Post la entombiga ceremonio mi eksciis, ke ĉeestis klarvida sinjoro, kiu esprimis, ke li vidis la edzinon de la mortinto kaj mian same mortintan filinon ricevi la spiritan korpon de la novmortinto. Ĉu tio ĉi povas esti ĝusta?

**Respondo de Martinus:**
La spirita korpo ne estas io, kion oni ricevas dum la morto. Ĝi estas io, kion oni evoluigas kaj uzas, dum oni vivas en la fizika sfero. Krome ne temas pri UNU, sed fakte pri entute kvin spiritaj korpoj krom la fizika, per kiuj la viva estulo vivtenas permanentan, maldorman, tagkonscian vivtravivadon. La vivtravivado de viva estulo estas kombinita kunlaboro inter ses malsamaj bazenergioj aktivigitaj de la mio per rilataj ses malsamaj bazenergikorpoj. Dum la estulo vivas en la fizika aŭ materia sfero, tiu ĉi kunlaboro estas koncentrita je la fizika tagkonscio, kiu estas portata de la fizika korpo. Dum la dormo la kunlaboro estas koncentrita en unu el la aliaj kvin korpoj, kiuj ĉiuj estas el spirita aŭ radieca naturo. Mortinte la estulo ja perdas sian fizikan korpon, sed ĝi ne perdas la en la cerbo kaj la nervosistemo koncentritan, maldorman tagkonscion. La tagkonscio simple translokiĝas al unu el la spiritaj korpoj, kiu estas aparte maturiĝinta kaj adaptiĝinta al tiu ĉi. La apaptiĝad- aŭ maturiĝadprocezo okazas ĉiunokte dum la fizika dormado. Perdinte la fizikan korpon la estulo nur perdis la eblon rekte travivi la pure fizikan aŭ materian influon, kiu antaŭe transformiĝis en ĝian tagkonscion tra la fizikaj sensiloj. Sed ĉian energiaktivadon forme de pensoj ĝi daŭre povas travivi. Pro tio ĝia estado iĝas sekve ne plu materia, sed tamen ekzistas en pensomondo. Ĝia travivado estas sole tio, kion ĝi povas manifesti per pensoj kaj kreadoprocezoj en materio kiu ekzistas ekster la fizika sfero kaj pro tio estas el spirita aŭ konscieca naturo.

Dum la estulo dormante nur parte transdonis sian vivtravivadon de ĝia fizika al ĝia spirita korpo (ĝi daŭre povas dum la dormado reagi al fortaj fizikaj influoj, se ne estus tiel ne ekzistus io kio nomiĝus ”veki dormanton”), tiu ĉi transdonado post la morto iĝas totala. Tiu ĉi totala transdonado de la konscio de la fizika al la spirita sfero povas esti observata per tre evoluinta aŭ perfekta klarvido. Sed tiu ĉi totala transdonado de la tagkonscio de la fizika al la spirita korpo igas, ke tiu ĉi korpo kvazaŭ iĝas pli matereigita kaj sekve pli videbla. Povas esti, ke tiun ĉi procezon, la priparolita klarvida sinjoro vidis. Sed, ĉar rakonto pri tia klarvida vido ne povas esti kontrolita de estuloj, kiuj ne havas altevoluintajn psikajn kapablojn, ĝi estu traktata kun granda rezervo, same kiel ĉiuj similaj nekontroleblaj, psikaj, mediumaj aŭ okultaj asertoj.

# La vojo al paradizo. Eltiro de libreto 25

de Martinus



**50.** ***La religia paradizo kaj aliaj revoj de la estuloj***

Ĉiuj homoj, kiuj kredas je la paradizimago de sia religio, kaj por kiuj ĝi fariĝis iliaj espero kaj deziro post la morto, kompreneble spertos la plenumiĝon de tiu ĉi. La kristanaj homoj spertos la plenumiĝon de sia paradizimago. Ili spertos sian aniĝon al la granda blanka grego de ”la savitaj” aŭ ”la sanktigitaj” antaŭ ”la trono de Dio” kaj spertos la kunligitajn altigitajn detalojn, je kiuj ili lernis kredi. Sed la granda kolektiva vizio ne povas kovri ilian tutan spiritan vivon. Ili ĉi tie ankaŭ spertos plenumiĝon de eventualaj aliaj revoj, eĉ se tiuj eble nur estas duarangaj kompare kun iliaj religiaj revoj aŭ revostatoj. Kredantoj povas ĉi tie en la fizika sfero havi revojn, kiuj estas flankaj al iliaj religiaj revoj. La samo validas ankaŭ por ĉiuj kredantoj de aliaj religioj aŭ sektoj. Ili ricevos la plenumiĝon de ĉiuj siaj religiaj revoj kaj eventuale aliaj fortaj revoj en sia paradizo de la spirita sfero. Kiuj el ĉi tiuj, kiuj fariĝos la unuarangaj, ĉu la religiaj aŭ la materiaj, tio dependas de tio, kiuj plej multe okupas ilian pensadon, deziron kaj volon.

**51.** ***La nehumana aŭ la besteca paradizo***

Ni ĉi tie faros diferencon inter la nehumana paradizo kaj la humana paradizo, kiujn denove eblas esprimi kiel la bestecan paradizon respektive la homecan paradizon. La besteca paradizo estas tiu, en kiu la bestoj spertas sian paradizstaton post la morto. Pro tio ke ĉi tiuj estuloj ne kapablas krei iun apartan revon, ilia paradizo iĝas ia spirita travivaĵo de ilia fizika stato, sed en vizia formo. Aldoniĝas al tio ĉi, ke la bestoj spertas nek timon nek teruron, pro tio ke ĉi tie ili ne estas ĉasataj, nek de homoj nek de rabobestoj. Ili ankaŭ ne povas malsati aŭ frosti. Ĉio adaptiĝas laŭ iliaj postuloj kaj deziroj. Ili vivas en stato, kiu por ili povas esti la plej alta agrablo, feliĉo kaj bonfarto. Ĉar ili ne povas havi malbonan konsciencon aŭ veni en konflikton kun si mem, ili ne povas havi iun purgatorian sperton krom la malgrandan sensoŝanĝiĝon, kiu necesas por liberigi ilin de mallumaj pensoj, maltrankvilo kaj timo. Pro tio ilia paradizrestado aŭ elkarniĝo fariĝas relative mallonga. En la sama paradizregiono plenumiĝas ĉiuj revoestadoj, kiuj estas bazitaj je memfido, materiaj kaj pli aŭ malpli mortigaj idealoj: viandomanĝado, ĉasado, fiŝkaptado, monemo, dummilitaj heroagoj, boksado kaj luktado, krome ĉiuj aliaj revoj pri esti heroo, esti riĉulo, esti filmstelulo, esti kavaliro de tiu aŭ alia ordeno, esti altrangulo, esti princo kaj simile. Sed ĉi tie plenumiĝas ankaŭ la pli ĝeneralaj revoj, kiuj nur estas ĉiutagaj aferoj en idealigita stato ĉi tie en la spirita sfero. La revoestado aŭ paradizo de la granda plejmulto estas nur la travivaĵo de elpensitaj nuntempaj ĉiutagaj fizikaj materiaj estadoj, sed kompreneble sen ĉiuj problemoj, malagrablaĵoj kaj luktado, kiuj kutime akompanas ĉi tiujn formojn

de estadoj, kiam ili estas travivataj en la fizika sfero. Ĉi tie en la paradizo ili ja nur povas esti spertataj ĝuste en tiu maniero, en kiu ties elpensantoj deziras ilin. Estas kompreneble ankaŭ ĉi tie, kie la estuloj spertas la paradizstatojn de la nehumanaj religioj, bazitaj je la idealigo de la realigo de la mortiga principo: milito, murdado, hom- kaj best-oferado kaj aliaj nehumanaj agoj kiel esprimoj de la dioadorado.

**52.** ***La humana aŭ la homa paradizo***

En la humana aŭ la homa paradizo ni trovas la plenumiĝon de ĉiuj revoj, kiuj iras direkte al humaneco aŭ proksimula amo. Homoj kun revoj helpi malfeliĉe orientitajn estulojn spertos ĉi tie en la spirita sfero siajn revojn kiel gardanĝeloj. Estas ĉi tiuj estuloj, kiuj helpos la estulojn eliri la purgatorion kaj eniri la por ili individue plej taŭgan paradizon aŭ dezirestadon. Ankaŭ estas la estuloj de tiu ĉi paradizregiono, kiuj partoprenas en la preĝoplenumado de la fizikaj estuloj kaj helpas pri iliaj sortoj, tiom bone kiom eblas de la spirita sfero. Ili ĉeestas ĉie kaj povas ofte eĉ reale interveni pri la sorto de fizika estulo kaj en ŝajne mirakla maniero helpi ĝin trairi seriozan krizon. Ĉi tie en ĉi tiu homa paradizregiono ni trovas ankaŭ la antaŭe menciitan paradizon de la artistoj, same kiel ĉi tie kompreneble ankaŭ ekzistas paradizo de la realigantoj de la scienco, kie ili spertas la plenumiĝon de siaj revoformoj. Sekve ekzistas lumanta paradizo por ĉiuj ekzistantaj vivaj estuloj.

**53.** ***La korespondado inter la estuloj en la paradizo***

Rilate la reciprokan korespondadon de la estuloj kaj manifestadon unu por alia, ĝi iĝas io alia ol ĉi tie en la fizika sfero. Ni jam scias, ke pensoj de estulo videblas en la spirita materio kaj povas esti observataj de kunestuloj. Tiel la reciproka korespondado ĉi tie fariĝas rekta. La estuloj ne devas paroli por interŝanĝi mesaĝojn. Ili pensas, kaj la pensoj materiiĝas fulmrapide en la spirita materio kaj poste staras videblaj por la kunestulo, kies respondo tiam simile formiĝas fulmrapide en la materio kaj iĝas videbla. En tiu ĉi korespondado, dum kiu la pensoj rekte spertiĝas de spirito al spirito, reale ne bezonatas iu sonlingvo, post kiam la estulo unue trairis la purgatorion kaj kutimiĝis al la spirita estado. Sed dum la unua tempo tuj post la morto, la estulo ankoraŭ estas submetita al la fizika kutimstato rilate al manifestadformo kaj spertado. Kaj kiom longe ĝi estas submetita al tiu ĉi, ĝi spertas la vivon preskaŭ kiel fizikan samtempe kun tio, ke ĝi iom post iom ekkomprenas, ke ĝi ne plu bezonas esti submetita al la apartaj manifestadleĝoj de la fizika sfero kaj gravito. Ĉio estas ĉi tie kondukata al novaj principoj kaj leĝoj, al kiuj ili iom post iom kutimiĝas, kaj kiuj igas, ke la materio ĉi tie en la spirita sfero, kiel menciite, materiiĝas aŭ formas sin laŭ la penso, la deziro kaj la volo sen ajnaj helpiloj eksteraj. La korespondregiono estas por la estulo nun limigita al estuloj kaj aĵoj, kun kiuj ĝi ne povas ekhavi fuŝkontakton aŭ malharmonion. Pro tio neniam povas ĉi tie ekesti batalo, kverelo aŭ malinterkonsentoj kun io aŭ iu. Ĉiuj koncernaj paradizestuloj estas en la sama mensa ondolongoregiono. Estuloj el pli altaj formoj de paradizoj povas mesaĝi al estuloj en la malpli altaj paradizoj, sed estuloj en la malpli altaj paradizoj ne povas eniri la paradizojn de la pli altaj estuloj. En la paradizo la estuloj povas renkonti tiujn el siaj amikoj kaj konatoj, familio kaj aliaj parencoj, kiuj antaŭe formortis de la fizika sfero kaj eniris la saman ondolongoregionon de la paradizo, en kiu ili mem troviĝas. Sed ili povas manifesti nur absolutan afablecon unu al

alia, sendepende de kian ajn rilaton ili reciproke havis en la fizika sfero. Malamikeco kaj antipatio ne ekzistas en paradizo bazita je la trairado de la estuloj tra la purgatoria proceso. La reciproka korespondado de la menciitaj estuloj iĝas pro tio treege luma kaj viviga aŭ ĝojiga. Maleblas por ili mallume rigardi ion ajn. Sekve ili ĉi tie en sia paradizo ricevas la eblon sperti, ke ĉio estas tre bona.

**54. *La normala korespondad-kontakto inter la fizikaj kaj la spiritaj estuloj***

Rilate la kontakton inter la spiritaj aŭ la elkarniĝintaj estuloj kun la estuloj en la fizika sfero, tiu ĉi normale estas okazanta dum la dormperiodo de la fizikaj estuloj. Kiam la fizika estulo eniris profundan dormadon, ĝi estas, se ne tute liberiĝinta de sia fizika organismo, tamen tiom multe ke ĝia uzado por korespondado estas neebla, kaj la dormanta estulo troviĝas ekde tiam en la spirita sfero kiel duonspirita estulo. La sama estulo havas nun en tiu ĉi sia, en la fizika sfero dormanta, sed en la spirita sfero maldorma, tagokonscia stato, eblon serĉi kontakton kaj korespondadon kun tiuj el siaj ”formortintaj” parencoj, amikoj kaj konatoj, kiuj troviĝas en la paradizo, al kiu ĝi mem apartenas dum sia normala dormado. Same ankaŭ ĝi mem povas esti serĉata kaj trovata de la menciitaj ”formortintoj”, kiuj ekzistas en pli alta paradiza regiono. En la sama maniero ankaŭ ĝi mem povas serĉi ”formortintajn” parencojn kaj amikojn, kiuj troviĝas en malpli alta paradizo ol ĝia propra. Sekve estas eblo por ĉiuj, kiuj estas ligitaj per simpatio aŭ amo, ekhavi reciprokan kontakton en la spirita sfero. Sed la korespondado ĉi tie estas do limigita al regionoj, en kiuj, kiel antaŭe menciite, la estuloj ne povas ekhavi konflikton aŭ kverelon inter si. Ili nur povas korespondi en ondolongoregionoj, kiuj estas paradizaj, kio signifas: estas ĝojigaj. En la fizika sfero la estuloj ja povas diskuti en ĉiuj kampoj, kaj en tiuj, pri kiuj ili estas nepretaj aŭ pli aŭ malpli nesciantaj, kaj en tiuj, pri kiuj ili estas pretaj aŭ sciantaj. Pro tio ĉi, ili en la menciitaj kampoj havas grandan eblon eniri konfliktojn, kverelojn kaj militojn. Tio ĉi estas do tute neebla en la diversaj paradizoj escepte de tiuj, en kiuj la militoj aŭ la malhelaj aŭ mortigaj pensoklimatoj estas revoj kaj paradizoj. Sed tie estas nur elpensitaj kaj sekve artefaritaj kaj ne realaj situacioj, kiuj ekestas. Pri tio ke la fizikaj estuloj en sia maldorma tagokonscio ne povas memori sian eventualan korespondadon aŭ pensointerŝanĝon kun estuloj en la spirita sfero dum la dormado, kulpas nur tio, ke la ĉi tie apartenantaj memorsensoj fariĝas malŝaltitaj, tuj kiam la estulo vekiĝas kaj fariĝas tute fizike konscia. Tiu ĉi cirkonstanco estas vivkondiĉiga necesaĵo, por ke la spirita spertostato dum la dormo ne fariĝu grava obstaklo aŭ ĝeno por la maldorma, fizika tagokonscio aŭ ĉiutago de la estulo kaj sekve en ĝia evoluo de besto al homo. Estas pro tio, ke la spirita estado nur povas ekzisti kiel paradiza. Se la memoroj de la malfeliĉaj fizika vivo aŭ sorto de la estuloj ne povus esti forŝaltitaj de ilia paradizo, la paradizospertado estus neebla. Kaj se la memoroj de la paradizspertoj ne povus esti forŝaltitaj de la fizika ĉiutagvivo, tiu ĉi kun siaj ĉagrenoj aŭ mallumaj statoj estus spertataj de la estulo kiel pli aŭ malpli granda malfeliĉo kompare kun la mirindaĵo de la gaj- kaj feliĉstato de la paradizspertoj. Eĉ la plej belaj fizikaj sortoj sentiĝus kiel mensaj frostotremoj aŭ ĉiuvivem-malkonstrua ŝoko, kiu nur povus naski mortigan melankolion aŭ vivenuon. Oni sekve komprenas ĉi tie denove la perfektecon de la dieca vivordo kaj malkaŝon de la ĉioscio, ĉioamo kaj ĉiopotenco de Dio.

(Esperantigis la tekston Hokan Lundberg.)

NOVA LIBRO



# Pri la eldono de La Eterna Mondbildo, libro 6

de Ole Therkelsen

**1. La eldono de la sesa simbollibro en la dana kaj sveda**

Sabate la 9an de majo en 2015 okazis prezentado káj en La Martinus Instituto en Kopenhago káj ĉe la eldonejo Värdsbild förlag en Hälsans Hus en Stokholmo okaze de la eldono de La Eterna Mondbildo, libro 6. La libro, kiu enhavas la 23 lastajn de la 100 simboloj de Martinus tiel eldoniĝis samtempe en la dana kaj sveda.

Tiu ĉi simbollibro nur enhavas simbolklarigojn de Martinus mem. La klarigoj estis surbendigataj dum la periodo 1955-1972. Dum la vintra duonjaro 1955-56 Martinus prezentis dekkvin grandajn kursprelegojn sub la komuna titolo La Eterna Mondbildo. Tie li publikigis grandan parton de tiuj simboloj, kiuj nun estas eldonitaj en La Eterna Mondbildo, libro 6. Aliaj simboloj de la libro estis montrataj al la publiko tra la kursprelegoj "Tra la morto 1-2", "Post la morto", "La plej alta fajro 1-4" kaj "La eterna vivo 1-4", kiuj okazis en la jaroj 1958-1962.

En 1971 Martinus diris: "Kio restas por mi finfari estas la kvara simbollibro kaj du kromaj simbollibroj. La analizoj en la lasta volumo estos tre interesaj, ĉar ili estos analizoj pri la planedoj kaj la globoj." (La Eterna Mondbildo, libro 6, parto 76.1).

Per la eldono de ne malpli ol 67 simboloj en la menciitaj tri simbollibroj en 1994, 2012 kaj 2015, la studanto tiel ekhavis eblon propriĝi al si pli bonan rigardon super la spirita scienco de Martinus. Ŝajnas al mi speciala kaj ĝojiga okazo, ke ĉiuj interesatoj tiel ekhavas aliron al studado de ĉiuj simboloj de Martinus.

**2. Martinus deziris, ke la bendregistraĵoj transiĝu al libra formo**

En la menciita kurso en 1955-1956 Martinus trairis la tutan mondbildon en ĉiuj detaloj. La kurson li mem priparolis kiel "Totalkurso" kaj "Grandkurso" kaj kiel "fundamenta kulturdokumento" (vidu sube). La plejparto de la simboloj en la sesa simbollibro estis klarigata en tiuj kursprelegoj. En kontaktletero Martinus skribas, ke li deziras la bendregistraĵojn de ĉi tiuj prelegoj transigataj al libroformo.

Martinus: "Eta grupo de civilinĝenieroj ene de la amikaro de mia afero kreis kunlaboron pri registrado de miaj prelegoj kaj kosmaj analizoj por benda kaj diska reaŭskultigo. Mi tial decidis krei kompletan trairon de la kosmaj analizoj de la universo avantaĝe al tiu registro. Ĉi tiu kompleta trairo tiumaniere estos poste akirebla forme

de bendo kaj disko, same kiel ĝi kompreneble ankaŭ estos transigata al libroformo. Tiel ekestos unika okazo, por amikoj kaj interesatoj de mia afero, sperti ĉi tiun mian personan trairon de la tuta mondbildo je ties ĉiuj esencaj detaloj, okazo, kiu plejverŝajne neniam estos ripetata. […] Per viaj intereso kaj simpatio pri mia tasko vi tiel helpas certigi aliron por la mondo al ĉi tiu fundamenta kulturdokumento". (1955-09-16, Kontaktletero n-ro 19).

En letero al Vignir Andrésson, Islando, skribas Martinus, ke li deziras la grandkurson kun simboloj transigita al libroformo kaj tradukita al la islanda.

Martinus: "Kiel antaŭe menciite, miaj prelegoj kaj kurso estos surbendigataj por poste esti transigataj al libroformo kaj diskoj. Rilate al tio mi decidis krei Grand-Kurson pri la kosmaj analizoj de la universo. Ĝi komenciĝos la 6an de oktobro ĉi tie en la prelegejo de la instituto kaj estos trairo de la kosmaj analizoj kaj la eterna strukturo de la mondbildo je ĉiuj detaloj de A al Z, akompanate de ĉiuj simboloj kaj aliaj suplementaj bildoj. Estos unika okazo por miaj amikoj ĉi tie en Kopenhago ĉeesti ĉi tiun mian personan kaj buŝan trairon de la eternaj faktoj je sia tuta etendiĝo, okazo, kiu plejverŝajne neniam estos ripetata. Ĉi tiu granda trairo de la mondbildo estos registrata sur bendon, de kie ĝi poste estos transigata al libroformo kaj diskoj. Ĉi tiu trairo tiel iĝos la plej



*En 1937 Martinus prelegas en la unua malgranda prelegejo. Oni vidas la grandan projektilon per kiu Martinus montris la simolojn, kiujn li permane pentris sur vitraj pladoj 8 x 8 cm.*


granda kaj plej kompleta kurso, kiun mi ĝis nun donis pri la totala analizo de la vivo, kaj ĝi tiel estos vera Grand-Kurso, kies teksto plenigos centojn da libropaĝoj. Kiam ni venos al tio, ĝi multe plifaciligos la studrondan laboron ĉirkaŭe en la mondo." (1995-10-01, el la leterdatumbazo, martinus.dk).

Ĉi tiu grandkurso tamen ne estis tradukata al la islanda, kiel sciigas posta korespondaĵo. Martinus ekkomprenis, ke la transskribo de la bendo ne estas taŭga por rekta traduko. La bendotransskribo devis unue esti prilaborata.

Ole Therkelsen
www.oletherkelsen.dk
www.oletherkelsen.info
www.varldsbild.com
martinusshop.dk



*En 1928 la juna Martinus montras simbolon n-ro 86 "La analizo de la homa evoluo. La evoluŝtupoj de la terglobo". Ne malpli ol 87 jaroj poste en majo 2015 ĝi finfine estis eldonita en la nova sesa simbollibro "La Eterna Mondblido, libro 6", kiu enhavas la lastajn 23 de la 100 simboloj, kiujn Martinus entute desegnis dum sia vivo. La simbolklarigo devenas de la surbendigo de prelego fare de Martinus en la Instituto la 10an de novembro 1955.*




*Sur la kovrilpaĝo de Kosmos n-ro 5, 1950 oni povis antaŭ 65 jaroj vidi la simbolon "La purgatorio". La simbolo montras, ke hodiaŭ la malluma purgatorizono okupas la kulminan lokon en la kosma aŭ spirita strukturo de la tero. La simbolo do ne montras la terglobon en la vera bestoregno aŭ la bestoregno pure kaj nure. Tiu ĉi simbolo de la bestoepoko de la terglobo kaj la purgatoria epoko de la homaro aperas kolore kiel simbolo n-ro 80.*

**Eltiro de la simbolklarigo**

En la mezo ni vidas la fizikan terglobon. La tuta radieca strukturo, kiu ekzistas ekster tiu ĉi globo, esprimu la konscion de la tero, ĝian aŭreolon aŭ radiaŭreolon, kiu estas sfero aŭ mondoj de ĝia mikrovivo kaj sekve ankaŭ de la plej multaj el ĝiaj homoj. La plej proksima radikampo tuj ĉe la fizika globo estas la beata regno, kies efikoj al la fizika sfero konsistigas la mineralan regnon. Ĉi tie la estuloj travivas nur sian propran enan mondon, kio signifas: ilian memorregionojn. Poste venas la instinktregiono de la tero, kiu konsistigas la spiritan sferon, en kiu la estuloj de la plantoregno kune kun ĝia ena mondo havas sian spiritan teritorion, kaj de kie ĉi tiuj estuloj komencas ekhavi la unuan malfortan ĝermon de la maldorma konscio en la fizika sfero, kiu faras ilin animalaj estuloj aŭ tiaj estuloj, kiujn ni en la fizika sfero nomas "bestoj", kaj al kiu estulspeco ankaŭ la neiniciata terhomo pli aŭ malpli apartenas.

Post tiu ĉi transformado de plantoj al bestoj la spirita hejmloko de la estulo fariĝis la sekva radikampo en la simbolo. Estas la fizika manifestiĝo de tiu ĉi radikampo, kiun ni konas kiel la bestoregnon, sed kies spirita kampo en la kosma sfero esprimiĝu kiel "la purgatorio" aŭ la kosma morto, kiu estas la rezulto de la "ĝuado de la arbo de scio". Estas la teritorio de la militoj, la malamo aŭ la spirita mallumo, kiu post la morto estas la koŝmarsfero de la purgatorio aŭ la malbona konscienco. (Kosmos n-ro 5, 1950).



© Martinus Institut 1981 Reg. 85

*Dum sia 82-a naskiĝtagparolo la 11an de aŭgusto en 1972 montris Martinus la tiufoje novkolorigitan simbolon "La spirita strukturo de la terglobo en la bestoregno" kaj donis la mallongan klarigon, kiu estas prezentita ĉi malsupre ekde paragrafo 85.1. Per tiu ĉi simbolo Martinus do komencis laŭ sia parolo novkolorigadon de la tuta simbolserio pri la terglobo en ses regnoj.*

**Simbolklarigo de "La spirita strukturo de la terglobo en la bestoregno"**


**85.1** La terglobo estas viva estulo. Kiel ĉiuj aliaj vivaj estuloj ankaŭ globoj trairas la spiralciklojn. Iam ĝi troviĝis en la plantoregno (ruĝa koloro) de la globspiralo, sed nun ĝi atingis pli longe. Ĝi forlasis la plantoregnon kaj estas nun en la bestoregno kaj la regiono de la tera aŭ nepreta homo (oranĝkolora koloro). La konscio de la globo estas simboligita per la granda stelokampo kun oranĝkolora koloro, kiu estas la koloro de la pezenergio. La kampoj ekster la desegnaĵo de la terglobo simbolas la spiritajn regionojn de la terglobo. Mi ne bildigis Amerikon, pro tio ke, Ameriko estas favorigita, aŭ ke ĝi estas iel aparta, sed mi pensis, ke oni povus pli facile vidi, ke temas pri la terglobo, montrante la konturojn de Ameriko.

La tero iam havis epokon, kiam ĝi estis planto, kaj sur la simbolo videblas la ŝrumpanta plantoregno (ruĝa koloro). Tiel komencis aperi bestoestuloj, kaj iom post iom ni venis al la terhomo, kiu nun atingu la stadion de la vera homo (flava koloro).

Momente mi havas nur tiun ĉi simbolon preta. Venos ses simboloj. La venonta simbolo do estos la vera homregno. En la vera homregno la granda stelokampo estos flava (la sentoenergio), kaj ankaŭ la aliaj energioj proksimiĝos al la mezo.

Tiun ĉi simbolserion mi antaŭvidas estu farita kiel vivantaj bildoj, tiel oni povas vidi, kiel ĝi funkcias, kiel la energioj vibras centren kaj denove aperas ĉe la rando. Tiel eblas vidi, kiel la eterneco funkcias, kaj kiel la tutaĵo sumiĝas en la eternecon.

*La Eterna Mondbildo, libro 6, par. 85.1*




© Martinus Institut 1981 Reg. 100

Simbolo n-ro 100

Manskribita klarigo sur simbolo:
*"La senkaŭza kaŭzo" aŭ "la una kaŭzo".*
Tio malantaŭ ĉiuj aĵoj ekzistanta "io", kiu konsistigas triunuan principon:
X1, kiel la Patro, la Providenco aŭ la Tutaĵo.
X2, kiel la en la universo ekzistanta "krea kapoblo" aŭ "mondo de la sparkoj".
X3, kiel "la mondo de formoj" aŭ "la kreita".


Simbolo n-ro 100, *La senkaŭza kaŭzo aŭ la una kaŭzo*, estas la unua simbolo, kiun Martinus desegnis. Ĝi estas simbolo n-ro 1 en la malgrana skiza kajero de 1924, kiu enhavas dek simbolojn. La frontpaĝo de skiza kajero portas la titolon *Anticipa studo por farado de "Livets Bog" en bildoj*. Poste Martinus nuligis naŭ el dek simboloj en la skiza kajero per la vortoj: "La dezegnaĵoj en tiu libro estas tute senvalidaj kaj ili ne estu uzitaj en la interpretado de *La analizoj de la Vivo*. Tamen escepto estas n-ro 1". Tiel la unua simbolo de Martinus fariĝis la lasta simbolo, n-ro 100, en la simbolverko *La Eterna Mondbildo*, libroj 1 - 6.

# Klarigo de simbolo n-ro 95, La dupolusa estulo

**95.5** La simbolo montras la plej alte evoluintan homon, la plej perfektan homon. La polusoj estas ekvilibriĝintaj, kaj la estulo iĝis dupolusa. La homa naturo estas venkinta kaj iĝis komplete reganta. La du polusoj estas ekvilibriĝintaj. Tio okazas, kiam la mortiga stato de la ordinara poluso estas malaperinta, kaj kiam la poluso de amo estas aperinta, kaj ili estas kontaktiĝintaj unu kun la alia.

Super kaj sub la du horizontalaj linioj ni vidas la areojn de la superkonscio, kaj inter tiuj du linioj ni vidas la subkonscion. Ni vidas, ke la areo de sento estas avance evoluinta, ĝi estas plenigita de humaneco, kaj ni vidas grandan areon de inteligento, kiu harmonias kun la sento. Tio montras, ke la sento estas intelektigita, kio signifas, ke la sento estas logika. La sento estas logika, kiam sento kaj inteligento estas ekvilibraj, kio estas same kiel amo. Ĉi tio estulo tiel havas grandan gradon de amo. Sed tiel ĝi ekhavas ankaŭ grandan gradon de intuicio, tiel ke ĝi estas komplete konscia je la kosmaj sferoj kaj je la mistero de la tuta universo. Ne estas mistero por tia estulo. Ĝi konas ĉiujn leĝojn. Inter la evoluŝtupoj de la unupolusa kaj la dupolusa estuloj ni povas loki ĉiujn homojn sur la terglobo.

*La Eterna Mondbildo, libro 6, par. 95.5*



© Martinus Institut 1981 Reg. 95

**Prelego pri Martinus kaj Zamenhof dum la 75a Hispana Kongreso de Esperanto**

Dum la Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Herrera del Duque (Ekstremaduro), inter la 30a de junio kaj la 4a de julio 2016, mi prelegos pri Martinus kaj Zamenhof. La enhavo de la prelego estos bazita sur la broŝuro "Martinus kaj Zamenhof, du pacosemantoj" de Hokan Lundberg, la libro de Ole Therkelsen "Martinus kaj la nova monda moralo" kaj la verko de Martinus.

Mi profitas por inviti vin partopreni en la 75a Hispana Kongreso de Esperanto. Ĝi estos speciala internacia renkontiĝo. Venos esperantistoj el Rusio, Litovio, Svedio, Italio, Francio, Belgio, Pollando, Serbio, Usono, Mongolio, Senegalo, RD Kongo, Germanio, Mongolio, Brazilo, Portugalio (...) Por pli da informoj, vizitu: www.esperanto.es/kongreso

**Centro Martinus en Hispanio**

La 3an de julio 2016 inaŭguriĝos la hispana *Centro Martinus* en Herrera del Duque, vilaĝo de la regiono Ekstremaduro. Ĝi okazos tuj post la prelego pri "Martinus kaj Zamenhof, du pacosemantoj" kadre de la 75a Hispana Kongreso de Esperanto. Tio signifas ke la Solena Inaŭguro estos Esperanta Inaŭguro. Jes, la plej multo de la ĉeestantoj estos esperantistoj el diversaj landoj de la mondo kaj la lingvo uzata estos Esperanto, la lingvo kiu naskiĝis por esti iam la internacia neŭtrala lingvo de ĉiuj homoj de la Tero.

La *Hispana Centro Martinus* estos dediĉita al la disvastigado de la spirita scienco de Martinus. Oni organizos kursojn kaj seminariojn pri la Kosmologio de Martinus en diversaj lingvoj, precipe en la hispana, sed Esperanto ankaŭ havos gravan rolon en la Centro, ĉar la ideo estas organizi kursojn de Esperanto konekse kun la nova monda kulturo kiun Martinus montras al ni en sia verko.

Do, la oficiala lingvo de la *Hispana Centro Martinus* estos Esperanto. La 9an de septembro 2016 okazos la dua inaŭguro. Ĝi estos "nacia" inaŭguro ĉar ĝi okazos por la hispanoj interesitaj pri la verko de Martinus.

La semajnfinon 23a-25a de septembro, Ole Therkelsen venos al Hispanio por prelegi en la Centro pri la Kosmologio. Li ankaŭ prezentos al la hispana kaj esperanta publiko siajn du librojn, "Martinus, Darwin y el diseño inteligente" kaj "Martinus kaj la nova monda moralo".

La Hispana Centro Martinus estos tute malferma al ĉiuj interesitoj pri la verko de Martinus. Ĉiuj el vi estas ĉiam bonvenaj.

Elkore salutas vin, *Javier Romero*

INFORMO PRI

## LA TRIA TESTAMENTO

La celo de la revuo Kosmos estas doni enrigardon en tiun mondbildon, kiun la verkisto Martinus (1890-1981) priskribis en vico da libroj kun la kumuna titolo: La Tria Testamento.
La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton. La disvastiĝo de la konoj pri La Tria Testamento okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

Eldonanto: Martinus-Instituto
Mariendalsvej 94-96
DK-2000 Kopenhago
Tel: (+45) 3838 0100
Telefontempo:
lundo-ĵaŭdo 13-16
vendredo: 9-12
DK p.ĝiro 642-9580
www.martinus.dk
esperanto@martinus.dk
shop.martinus.dk

Redakcio: Hokan Lundberg
kaj Mathias Dalmose.
Kompostado: Dan Elhaûge.
La frontpaĝa bildo: © Martinus Institut

Unuopa kajero: DKK 40,00

Kopirajto: © Martinus Institut
Redono de teksto nur laŭ skriba permeso.
Presita de Martinus Institut
ISSN 1600 4116.





# Bonvenon al Martinus-Centro, Klint!

## Pri la kosmologio de Martinus

- Ĝi donas logike bazitajn respondojn al multaj fundamentaj demandoj pri la vivo.
- Ĝi povas motivigi optimisman vivsintenon, kaj doni bazon por harmoniaj kaj simpatiaj rilatoj al ĉiuj homoj kaj ĉio viva. Tiel ĝi povas kontribui al la progresigo de la humana evoluo de la homaro.
- Laŭ la analizoj en La Tria Testamento ”ĉio estas tre bona” el eterna perspektivo. Ili ankaŭ donas defendon al ĉiuj homoj, kiuj ĉiuj senescepte nur povas agi laŭ siaj ĝisnunaj spertoj.
- La kosmologio igas ”alturni ankaŭ la alian vangon” kaj ”ami sian proksimulon kiel sin mem” scienco kaj ĝi montras ke ni ĉiuj iĝas pli kaj pli amemaj kaj saĝaj, vivon post vivo.
- Ne ekzistas iaj ceremonioj aŭ membreco rilate al la kosmologio de Martinus.



## Eo-semajno en Martinus-Centro en 2016

Inter la 6-a kaj 13-a de aŭgusto 2016 la Esperanto-semajno en Klint okazos paralele kun dana, sveda, angla kaj germana kursoj en internacia etoso. Matene estos interpretata prelego, poste studrondoj, posttagmeze estos konversaciaj rondoj. En la vespero estos prelego en Esperanto aŭ distra programo, ankaŭ estos teo kaj kukoj en la restoracio *Terrassen*.

## Kiel trovi Martinus-Centron en Klint

De Kopenhaga Centra Stacio (Københavns Hovedbanegård) unue per trajno al Holbæk. Tie necesas ŝanĝi trajnon, al Højby aŭ Nykøbing Sjælland. De tie al Martinus-Centro per aŭtobuso n-ro 563 aŭ per taksio. La vojaĝo de Kopenhago al la urbeto Klint daŭras ĉirkaŭ tri horojn.

Por aliĝi, bonvolu skribi al Martinus-Instituto aŭ esperanto@martinus.dk.

Martinus-Centro